


Kvar samvalora-paroj

Nun malkaŝu kio estas la intenco menciita ĉe la diagramo de problemo.




Diag. 1 Montritaj estas 8 lim-aranĝoj, krom A, po 2 por markoj 'a', 'b', 'c', kaj 'd'. (Ĉiuj markoj montras met-punktojn, kiam Nigro ŝtonmetas ĉi tien.) Ĉiu el tiuj lim-aranĝoj estas 'metrajton-perdanta ambaŭflanke', kaj tiuj kun sama marko valoras same.

Alivorte, paroj de lim-aranĝoj ĉe 'a': centro kaj MalSupra rando, ĉe 'b': Dekstra rando kaj MalDekstra rando, ĉe 'c': Supra Dekstra angulo, ĉe 'd': du en MalSupra Dekstra parto, estas respektive havas samajn valorojn, do estas alternativaj.

Sed nur lim-aranĝo ĉe 'A' estas malsama. Ne havas alternativon, kaj la baza karaktero estas malsama al aliaj lim-aranĝoj.


{paĝo 148 de la originalo}



Diag. 2 Ĉi tie B1 estas absolute metrajton-tenanta, kaj Nigro nepre devas respondi ĝin per N2. (Se Nigro preterlasus, Blanko mortigus la nigran ŝtonaron per B2.)

En goa termino, N1 estas 'metrajton-tenanta' {aŭ 'sekviga'}, kaj la valoro estas '1 poento'. (Rimarku diferencon de diagramo 3.)


Ordinare, en ĉi tia kazo, oni taksas ke Blanko unuflanka rajtas meti ĉi tiun lim-aranĝon, sed en iu malofta kazo Nigro metas ĉi tiun kiel 'inversa lim-aranĝo'.



Diag. 3 (Inversa lim-aranĝo; metrajton-perdante limaranĝi kie kontraŭulo povas metrajton-tenante lim-aranĝi.) Ĉi tiu problemo estas ĝuste la malofta kazo, kaj por nigro bone estas unue ŝtonmeti N1, 'inversan lim-aranĝon valora je 1 poento'.

{paĝo 149 de la originalo}

Post la ŝtonmeto N1, restas samvalora-paroj. Nigro povos ŝtonmeti unu el paro.



Diag. 4 (Se Nigro lasas Blankon ŝtonmeti B2,...) Se Nigro unue ŝtonmetas N1, lim-aranĝon en centro, kio okazas? Blanko kaptas la ŝancon efektivigi B2. Post Nigra singardo N3, Blanko ŝtonmetas B4, kiu valoras saman al N1.

Sekve, se Nigro ŝtonmetas N-a, Blanko B-b, se Nigro ŝtonmetas N-c, Blanko B-d. Blanko povas postseki Nigron. Metrajton-perdantaj lim-aranĝoj viciĝas kiel samvaloraj paroj, do ne okazas gajno/malgajno se oni la unua ŝtonmetas iun el paro, aŭ oni la dua ŝtonmetas la restan el la paro.

Tial, en la diagramo de problemo, por Nigro, kiu havas metrajton, kompreneble devus ŝtonmeti 'inversan lim-aranĝon valora je 1 poento. Devus unue eviti Blankan 'absolute

sekvigan lim-aranĝon', kaj poste sekvi la aliajn Blankajn lim-aranĝojn.

{paĝo 150 de la originalo}

Tamen, ĉi tiu decido bazas ĝustajn kalkulojn pri limaranĝoj, 'a', 'b', 'c', 'd', montritajn en diagramo 1. De la takso ke "la paroj etas respektive samvaloraj kaj alternativaj", rezone estas ŝtonmeti N1 en diagramo 3.

Nun ni esploru la valorojn de la limaranĝoj, 'a', 'b', 'c', 'd', en diagramo 1.